# BONA ESPERO



**Cirkulero 45** por la amikoj kaj subtenantoj de "Bona Espero" r.a., prezidanto:
s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a
D-48356 Nordwalde, tel. +2573/626

Karaj amikoj kaj subtenantoj, Nordwalde, 96-10-07

post la somero (en Eŭropo) ni povas denove al vi raporti el kaj pri Bona Espero. Kiel interkonsentite, mia edzo (Rudolf) kaj mi renkontis dum la Universala Esperanto-Kongreso fine de julio en Prago Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, por interŝanĝi novaĵojn kaj plani la pluan kunlaboron. Preskaŭ ĉiutage ni pli ol horon kunvenis, ĉar en Prago ni ĉiuj ja povis paroli kun multaj aliaj, el vi ekzemple, kun Brazilaj amikoj, inter ili eĉ la instruistino Patrícia el Bona Espero, kiun ni konatigis al vi per nia lasta cirkulero, kaj - neforgesende - kun interesatoj, kiuj intencas viziti Bonan Esperon minimume kelkajn semajnojn, por helpi tie.

Bedaŭrinde unu el niaj konkretaj esperoj ne realiĝis: Brazila geedza paro, kun kiu ni korespondis dum tuta jaro kaj kiu poste decidis iri al Bona Espero, tamen ne aperis tie. Ni do serĉadas plu, des pli, ĉar ni ja ĉiu-okaze vidas la bezonon de pli ol du plenkreskuloj, kiuj restos pli longe ol la kutimaj helpantoj.



Je nia ĝojo kontaktis nin simpatia instruistino, s-ino **Oliva van Eeghem** el Brugge/Belgujo. Kaj ŝi ne longe hezitis: post semajnfino ĉe ni en Nordwalde, kun multegaj fotoj kaj filmoj, kaj longaj informaj interparoloj, ŝi kuraĝe petis portempan liberigon de sia laborposteno hejme kaj flugos jam la 19an de oktobro al Brazilo. S-ino van Eeghem kompreneble parolas Esperanton, sed ankaŭ aliajn lingvojn, ekzemple la Hispanan, kaj estas sperta, vivi modeste ekster-Eŭrope, nome restinte jam dufoje en Indonezio. Ni spontane amikiĝis al "Olijf" kaj deziras al ŝi kaj al Bona Espero multan sukceson. Do, plia kaŭzo, venontjare denove... sed ni tamen ankoraŭ ne kuraĝas, antaŭplani jam tiom longe.

Pliaj helpantoj anoncis sin el Potsdam, el Polujo kaj Ruslando: kun kelkaj Ursula kaj Giuseppe jam interkonatiĝis dum sia restado en Eŭropo. Ankaŭ juna Finna-Belga paro, estante nuntempe en Japanujo, dezirus venontan jaron... Do, ankaŭ pri laborfortoj estas kelkaj perspektivoj.

En Prago ni transdonis tutan aron da grandformataj fotoj por monkolekta kampanjo en Berlino. Bedaŭrinde laŭdire tie malbona vetero ege malutilis. Konkretajn rezultojn ni tamen ne aŭdis.

La domo en Alto Paraíso, la filio de Bona Espero, baldaŭ ricevos sian tegmenton. Eksterordinara subtenanto kaj multjara amiko de Bona Espero sendis al ni 8.000 GM (krom sia monata mondonaco, kiu jam estas sufiĉe multe) por la domkonstruaĵo. Estus tre bone, se por la pli aĝaj knabinoj, kiuj vizitadas la pli altajn klasojn en Alto Paraíso, du ĉambroj povus jam esti preparataj, antaŭ la cetera finkonstruo, ĉar ĝis nun ja ĉiuj (sesope) loĝas en la dometo de Ada... Iom malmulte da loko por pli longa tempo, ili skribas, sed aliflanke ili ĝojas, esti jam duone memstaraj.

Kaj cetere: al ni mankos Paulo kaj lia fratino Anaketure, kies patrino forlokiĝis kun ili al São Paulo, supozeble al necerta estonto, kiel ofte. La ceteraj infanoj helpas al João Santana, konstrui "plaĝon" ĉe la akvorezervejo. Giuseppe skribos, ke ni miros, kiam ni venontjare denove venos. Ĉu "kiam"? Se... Sed ni ĉiu-okaze tiom ofte kun niaj pensoj estas en Brazilo ĉe "niaj" infanoj.



Sur la foto de maldekstre: Clarimundo, João, Amanda, Maria, Fátima, Rosamira, Andréia (kun Ursula Grattapaglia). Ĉu la junulinoj ne jam estas imponaj damoj?

Ili festas la ŝtatan ekzamenon de la instruistino Maria, kiu iam deĵoris en la lernejo de Bona Espero. Ŝi loĝas nun en dometo apud la knabinoj.

Tiel oni povas sekvi, kiel la iamaj infanoj iom post iom eniras la propran vivon: tre grava sprono por ni.

Kion Giuseppe plie raportis: Provo, kulturi malsekan rizon, kiun lanĉis la ŝtato, kiel atendite, fiaskis: rekompence la ŝtato liveris surprizan konsolon: tutan aŭton da rizo, por egaligi la perdojn. - Apud la malnova "pionira" domo ĉe la rivero ruinis kabano, kiun renovigis geedza paro el Uruguajo. Ili nun loĝas tie. - Multaj spiritualistoj el la grupo de Ergom kaj Intira, kiu instalis semajnfinan renkontiĝejon en Salto sur la grundo de Bona Espero, lernas Esperanton. La plej vigla, **Miriangela**, nun ankaŭ helpas en la lernejo. **Edinor**, la instruisto pri matematiko, kiu venis el Alto Paraíso, momente ne plu havas tempon, ĉar li rekandidatas por la urba parlamento. Sukceso de li plugarantius la subtenon de Bona Espero far la urbeto. - La 7an de septembro, la Brazila Tago de Sendependeco, la infanoj de Bona Espero partoprenis en festparado, kompreneble uzante la okazon por propagandi Esperanton. Tri tagojn pli frue Bona Espero estis sufiĉe alloge prezentata en la tutlanda televida programo "SBT-Reporter". Tiaj aferoj helpas ankaŭ, kolekti pliajn mondonacojn en la ĉefurbo Braziljo. - Cetere, **donacoj**: Kiel statas niaj financoj? 70 el vi ĉi-jare donacis entute 17.600 GM (kompare: dum la tuta jaro 1995a sumiĝis 22.400 GM). La aktuala buĝeto ampleksis 17.200 $ (ĉ. 26.000 GM), kiun ni ankoraŭ po[illegible]s pagi, dissolvante niajn rezervojn. Do, eĉ se ni povos denove kolekti pliajn 5.200 GM ĝis la jarfino, ni devos bedaŭrinde ŝrumpigi niajn kontribuojn. La forfalo de la ŝtataj subvencioj en 1995 nun draste rimarkeblas. Mi petas tial vin ĉiujn, eble varbi kromajn donacojn kaj donacantojn el inter viaj konatoj.
Pagoebloj: Kelkaj el vi helpas per la konto bone-z de Bona Espero ĉe Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, tra UEA-konto en sia lando (vidu malsupre). Tio estas la plej ŝpara kaj malriska vojo (sed ekzemple ne eblas de Francujo). Ĉar ni ne vidas enirantajn pagojn de tiu konto, bv. nepre informu nin per poŝtkarto unufoje jare, ke vi volas pluricevi nian cirkuleron. - Aliaj uzis tiun okazon, sendante monbiletojn. Tio ĝis nun ŝajne funkciis, sen konstateblaj perdoj, sed restas riske.
Precipan dankon al kelkaj **jubileuloj**, kiuj ankaŭ ĉi-jare petis siajn gastojn, donaci por Bona Espero anstataŭ al ili. Sen tiuj pli altaj sumoj la buĝeto de la lastaj jaroj jam estus ŝrumpinta. La Bonesperanoj mem lanĉis sukcesajn kampanjojn en Brazilo, ĉefe kolektante monon por la nova domo en Alto Paraíso. Do, ne ĉio dependas nur de ni, sed sen ni la ĝisnuna bona evoluo spertus drastan rompon.

*Multajn salutojn*

Por ŝpari bankkostojn, pagu laŭeble al UEA por la UEA-konto "bone-z",
sed informu nin, por ke vi pluricevu niajn cirkulerojn!
Poŝtkontoj de Universala Esperanto-Asocio/Rotterdam:
Belgujo: 000-1631831-97, Germanujo: Köln 3182 91-509 (bankkodo: 370 100 50)
Nederlando: Den Haag 37 89 64, Svedujo: 74374-0; Svisujo: Genève 12-2310-0